

Leterkesto-1

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI ..., 1991.10.10-12

CL- Nome de Svisa Radio Internacia parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND. Alvenis la momento respondi al la korespondaĵoj, kiuj sufiĉe rapide replenigis nian leterkeston. Ni multe dankas al ĉiuj skribintoj, kies nomojn ni mencias laŭ la alfabeto komencante per la litero V, kie ni haltis antaŭ kelkaj monatoj. Ni multe dankas tiujn, kiuj interkrampe indikas per la esperanta fonetiko, kiel prononciĝas iliaj nomoj kaj urboj, kaj kiuj substrekas sian familian nomon. Tio multe helpas al ni kaj ni opinias, ke tio devus fariĝi la normo inter la esperantistoj, ke konserviĝu la normala ortografiado de la nomoj familiaj kaj geografiaj, sed ke oni tamen kapablu ilin kontentige prononci laŭ proksimuma esperantigo.

A.- Saluton al Gerard VAN DER HORST-KOLINSKA en Den Haag, Nederlando, kiu aŭskultis niajn elsendojn eĉ okaze de vojaĝo en Pollando. Li atentigis pri erara anonco de niaj elsendoj en la angla lingvo. Dankon.

CL- Lia edzino Mila VAN DER HORST-KOLINSKA en Den Haag, Nederlando, petis la libro-liston, kiun Kultura Centro Esperantista kaj ILEI konsilas al trapasontoj de esperanto-ekzamenoj. Si esperas trovi en ĝi la verkojn "Paŝoj al plena posedo" de William Auld kaj "Faktoj kaj fantazioj de Marjorie Boulton." Jes, ambaŭ libroj estas konsilataj en tiu libro-listo.

A.- Arnold VICTOR en Nov-Jorko, Usono, skribis: "Mi restas fidela, konstanta kaj interesata aŭskultanto. Min aparte interesas kulturaj, politikaj, historiaj kaj esperantaj aferoj." Kiel multaj aŭskultantoj li petis la alsendon de kopio de nia prelegserio pri la formiĝo de la svisa federacio.

CL- Sinjoro VOROŜILOV en Soĉi, Bulgario, salutis mian edzinon per tiuj flataj vortoj: "Tutkore ni gratulas vin okaze de la Internacia Virina Festo kaj sincere deziras al vi multan sanon, ardan amon kaj pluajn sukcesojn en via agado ĉe Svisa Radio Internacia. Ni volas ĉiam plu aŭdi en la etero vian de multaj jaroj konatan tiom melodian voĉon per elsendoj de Svisa Radio."

A.- Mi dankas al nia bulgara aŭskultanto kaj salutas Wenzel Josef WEBER en Mönchklagladbach, Germanio, kiu sendis aŭdraporton.

CL- Saluton al Hugo WESTHOFF en Waltrop, Germanio, al Johannes WINDISCH en Singen, Germanio, kiu ŝatas la variecon de niaj radio-elsendoj, al Kjell ZEDER HOFF en Stømmen, Norvegio, al Bartocha ZENON en Rybnik, Pollando, kiu skribis, ke ŝi aŭskultis disaŭdigon la 20-an de majo en kiu la preleganto menciis, ke en Svislando la inflacio estas ĉirkaŭ 5 procentoj. Kaj ŝi komentarias:

A.- "Ho nur 5 procentoj. En Pollando la inflacio atingas eĉ 250 procentojn. Verŝajne post nelonge kreskos pagoj por energioj elektra, gasa, karba pli ol centprocente. Poste kreskos prezoj de aliaj varoj, ĉar ili dependas de la energio.

CL- Ni povas imagi, ke tiu inflacio faciligas nek la taskon de la dommastrinoj, nek tiun de la entreprenoj industriaj, agrokulturaj kaj komercaj, de kies dinamismo dependos la reekvilibro de la pola ekonomio. Povu baldaŭ alveni malpli zorgigaj novaĵoj. Saluton al Mozar ALVES en Belo Horizonte, Brazilo, kiu skribis: Imagu, ke mi pli aŭskultas vin en esperanto, ol viajn

elsendojn en mia nacia lingvo, nome la portugala. Rilate al la esperanto-movado la nuna situacio en mia lando ne estas vere bona. Oni rimarkas, ke la nuntempa brazila movado stagnas.

A. - Luis BLASCO skribis: "Mi registris vian muzikan programon pri alpa korno, kiu estis tre plezure aŭskultebla en mia malgranda Parko de la Paco apud mia loĝejo. Por unu el miaj amikoj, kiuj vizitas ofte tiun ripoz-ĝardenon por aŭskulti vian radian muzikon, mi kunportis la kasedon. Mia amiko laboradis dum kelkaj jaroj en Svisio, tial, kiam li aŭdis la alpan kornon, preskaŭ aperis larmoj ĉe liaj okuloj."

CL- Tio pruvas, ke ne nur svisoj emociiĝas pro sia folkloro muziko, sed ankaŭ gastlaboristoj, kiuj pere de ĝi sentas realvokon al montaraj pejzaĝoj. Saluton al Lucien BOURGOIS en Noyelles-Godault, Francio, kiu regule sendas la esperanto-organon, kiun li redaktas sub la titolo "Norda Gazeto". Li interese raportas pri akcepto de la vicprezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto fare de ministro. Mi citas lin: "La 5-an de februaro s-ro Alain DECAUX, ministro-delegito por la francparolantaj landoj, akceptis en sia oficejo Jean-Louis TEXIER, vicprezidanton de UFE kaj eks-estraranon de UEA. Tiun rendevuon estigis la ministro mem, post plurjaraj demarŝoj de la reprezentantoj de UFE kaj persona peto de Jean-Louis TEXIER, kiam li respondecis ĉe ia internacia asocio. La ministro ricevis plenan kolekton de la specialaj numeroj de "Franca Esperantisto", dediĉita al kompletaj tradukoj el la franca literaturo reprezentita per dudeko da plej elstaraj nomoj. La grava strebo de la franca esperantistaro tiamaniere diskonigi tutmonden la francan kulturon estis alte taksita de la ministro. La kabineta ĉefo de la ministro ĉeestis la tutan renkonton por interna raportado. Tre ampleksa superrigardo al la nuna franca instruanto pri esperanto, ĉefe en la universitatoj, al la historio de esperanto ekde la komenco montris tre bonan informiĝon de la ministro pri Esperanto. Ekzemple, li plene memoris pri la graveco de Boulogne-sur-Mer en niaj unuaj jaroj. Por akceli la agnoskon de esperanto en Francio sinjoro ministro DECAUX konsilis kontaktojn kun diversaj ministerioj."

A.- Lucien BOURGOIS konkludas dirante: "Nur estas bedaŭrinde, ke pasas monatoj kaj jaroj inter peto de rendevuo kaj ĝia okazigo, ĉar poste kaj la homoj kaj la cirkonstancoj ŝanĝiĝas."

CL- Saluton al Mirosław BRANCZEWSKI en Myszkow, Pollando, al Ivan BULANOV en Ivanovskaja ob, Sovetio, al Jean CALAMY en Aubagne, Francio, kiu sukcesis reregistri la legadon de lia letero en pasinta leterkesto elsendo, al Jason CASTLE en San Rafael, Kalifornio, Usono, kiu ĝuas niajn interesajn temojn per registraĵoj de niaj elsendoj haveblaj en la sonbenda servo de Esperanto-Ligo de Nord-Ammeriko kaj ekprovas nin ankaŭ rekte aŭskulti peronde.

A.- Ni konkludas nian hodiaŭan salutplenan elsendon menciante la nomon de CHAN Sook-Wai (ĈAN Sukŭaj) en Kuala Lumpur, Malajzio, kiu laboras por Malajzia Esperanto-Asocio fondita en majo 1989. Ĉar li sendis interesan mesaĝon, kiun ni ŝatus grandparte citi, la venontan semajnon ni remalfermos nian leterkeston resalutante lin kaj citante lin.

CL- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND diras al ĉiuj: ĝis la reaŭdo!